



8-6-1974

CGC Nº
00406 504/1000-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA - DISTRITO FEDERAL

Sede: Edifício Jockey Clube, sala 103
Setor Comercial Sul

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 - AP. 73

Telefone 4-8033

11.100 - Santos (SP)

SECRETARIA

Caixa Postal 07 - 1182

Telefone 226-1298

70.000 - Brasília (DF)

SETEMBRO/OUTUBRO DE 1980

ÓRGÃO OFICIAL DO BKE

BOLETIM Nº 57



Sur la foto: - De amldekstre. -S-ino Zoleva Felizardo, Prof-ro F.S. Almada (parolante, D-ro Ernani Corrêa kaj Pro-ro Manoel T. de Abreu.

1 - A SUD-BRAZILA RENKONTIĜO DE ESPERANTO

La evento okazis en Porto Alegre (RS), de la 19 - a ĝis la 21-a de septembro, 1980. Ĝin organizis ESPA - Esperantista Societo de Porto Alegre, kaj patronis ĝin la Brazila Konsilantaro de Esperanto.

La solena malfermo de la Renkontiĝo okazis en la nobla salono de la "Associação de Engenharia". Ĉeestis proksimume cent personoj el la Ŝtatoj San-Paŭlo, Minas Gerais, Paraná, Santa Catarina kaj el Rio Grande do Sul mem. Partoprenis elementoj el Argentino, Urugvajo, inter kiuj, la geedzoj



Sur la foto: - De maldekstre: D-ro Ivo Sanguinetti, Pastro Pedro Urbaitis kaj S-ino Izaura Sanguinetti.

Barrocas kaj s-ino Klara Hess, tiel la Renkontiĝo iĝis vere internacia.

La prezidanto de ESPA, D-ro Ernani Corrêa, salutis la ĉeestantaron kaj transdonis la direktadon de la laboro al prezidanto Almada, kiu klarigis la celon de la renkontiĝo kaj dankis la apogon al ĉiuj partoprenantoj.

La oficiala oratoro, D-ro Modesto Belmonte de Abreu, kiu faris brilan paroladon en bela Esperanto, estis varme aplaudita. Li legis la salutleteron de s-ano Nelson Pereira de Souza, sekretario de la LKK de la 66-a UK, okazonta en Brazilio (FD). Pluraj so-

cietoj sendis reprezentantojn el diversaj urboj de Rio Grande do Sul.

S-ano Carlos Cunha parolis pri la okazonta UK, pri ĝia graveco por nia lando kaj anoncis, ke ĝis la fino de la kuranta jaro ne altiĝos la aliĝkotizoj por brazilanoj.

Prof-ro D-ro Manuel Torres de Abreu invitis la partoprenantojn al la urbo Rio Grande por ĉeesti la inaŭguron de la busto de Zamenhof.

La Komunuma Sekretario por Edukado kaj Kulturo sendis reprezentanton, s-inon Zoleva Felizardo, profesorino pri angla lingvo. Ŝi en sia parolado esprimis grandan admiron pri Esperanto, kiun ŝi la unuan fojon aŭdis paroli. Ŝi trovis la internacian lingvon belsona kaj ekinteresiĝis pri ĝi. Prof-ro Almada ofertis al ŝi la libron "Esperanto Elementar".

La sekvantan tagon s-ano Cunha montris la belegan filmon pri Brazilo, esperante parolatan; la saman, kiun la LKK prezentis dum la 65-a UK en Stockholmo, kun granda sukceso ĉe la tiea ĉeestantaro.

Post tiu priskribo de la evento certe la leganto pensas, ke nenio nova okazis, temis nur pri iu plia esperanta renkontiĝo. Sed la I-a Sud-Brazila Renkontiĝo de Esperanto ne havis la tradician familian karakteron. Oni ne restis en salono por pridiskuti la agmanieron propagandi aŭ instrui la lingvon, ĉar la lertaj kaj progresemaj organizantoj prizorgis la ĉeeston de la TV Gauŝa kaj aliajn kanalojn el Porto Alegre.

Estis intervjuita D-ro Ivo Sanguinetti, organizanto de la evento; F.S. Almada, prezidanto de BKE kaj patrono de la Renkontiĝo, Carlos S. Cunha, reprezentanto de LKK de la 66-a UK kaj aliaj partoprenantoj. Pere de la televida aperigo de la intervjuoj miloj da neesperantistoj ekkonis ion pri la internacia lingvo ne nur en Ŝtato Rio Grande do Sul sed ankaŭ en la najbaraj.

35 - CENTRO DE TRADIÇÕES GAUCHAS

En la sidejo de tiu fama organizaĵo, kie ni vidis belegajn dancojn kaj kantojn de la gauŝa folkloro, D-ro Ivo Sanguinetti parolis en Esperanto kaj deklamis belegan poezion. En la tuta salono bone audiĝis la esperanta parolebleco.

PLURAJ OKZAJOJ

Dum la neforgesebla ŝip-ekskurso tra la rivero Guaiba, kiun partoprenis ankaŭ eksterlandanoj, oni kantis en Esperanto kaj ĉiuj klopodis ekzercadi la lingvon.

• • • • •

La katolikan diservon celebris du pastroj: Bruno Ostropolski, el Argentino, kaj Pedro Urbaitis, el San-Paŭlo. La himnojn tradukis esperanten nia klopodema D-ro Ivo Sanguinetti, kiu ankaŭ organizis ĝeĵunulojn esperantistajn kaj ne esperantistajn por ludi dum la meso kaj ilin kanti. La meso estis eksterordinare bela, kio ege plaĉis al la ne esperanta ĉeestantaro pro ĝia nekutimeco.

Ĉifoje la esperantistaro ne restis inter muroj, sed eniris pere de brilaj artikoloj de la gazeto "Correio do Povo", revuo "Destaque" kaj de TV- aparatoj en la hejmojn de miloj da neesperantistoj.

La revuo "Destaque" dediĉis tutan paĝon al Esperanto, ilustritan pere de fotoj rila-taj al I-a Kongreso de Brazila Konsilantaro de Esperanto okazinta en Juiz de Fora (MG) kaj aliaj. Bona laboro de nia s-ano Silva Velho.

• • • • •

En la montrofenestro de la Spiritisma Societo Alan Kardec - Sam-ino Nydia Krieger organizis esperantan ekspozicion. Ŝi gvidas kurson en tiu societo kaj ŝiaj geler-nantoj kantis dum la katolika diservo. Dum la semajno de la Renkontiĝo regis vere frata kaj esperanta etoso.

• • • • •

En la sidejo de ESPA D-ro Ernani Corrêa gvidas Esperanto - kurson. Ĝin partoprenas, inter aliaj, la familio Mota. S-ro Jesús, la edzino, s-ino Darlene, kaj la filino Cleide. S - ino Darlene estas fratino de nia kara sam - ino Denise Deslandes, el Barra Mansa (RJ). La kara familio lernas la internacian lingvon ĉar intencas partopreni la 66-an UK, en Brazilio.

• • • • •

Aparte ni devas rekonii la valoron de la laboro de familio Sanguinetti. S-ino Izaura ankoraŭ ne parolas Esperanton, sed ŝi aktive partoprenis, kune kun sia filo, Ivo José, en la fortostreĉa klopodo de nia vicprezidanto D - ro Ivo Sanguinetti. Pro la utila kaj efika laboro de la esperantistaro de Porto Alegre ni gratulas ĉiujn kunlaborantojn. Fakte temas pri iu altvalora eventoj.

RIO GRANDE (RS)

La 26 - an de septembro, en la urbo Rio Grande, estis inaŭgurita la busto de Zamenhof. Grupo de esperantistoj vojaĝis tien por la ceremonio, la pli multo el Porto Alegre.

La loka TV intervjuis niajn s-inojn: Prof - ro F. S. Almada, D-ro Ivo Sanguinetti, pastro Pedro Urbaitis kaj Prof- ro Manuel Torres de Abreu. Poste estis realigita ĉe la Federacia Universitato la inaŭguro de la busto. La TV akompanis kaj filmis la eventon. Flanke de la Universitato parolis la Rektoro Prof- ro Fernando Lopes Pedone. Ĉeestis proksimume kvindek personoj. Postsekvis parolado pri Esperanto en la granda salono de la Federacia Universitato farita de Prof-ro Almada. Fine okazis promenado tra la urbo per buso kun vizito al "Museu Oceanografico" de la Universitato de Rio Grande.

En tiu urbo aktivis Prof-ro Manuel Torres de Abreu kies laboro estas laŭdinda. S-ano Dirceu Porciuncula gvidas kurson kun bona rezultato.

PELOTAS (RS)

Rn tiu urbo instrua Esperanton Prof-ro Paulo Caruso, kiu bedaŭrinde ne povis partopreni la renkontiĝon.

S- ano Carlos Kunde Filho, el Pelotas, gravuris la tutan programon kaj promesis - ĝin disaŭdigi pere de radio en sia urbo. Li disvendis la libron "Esperanto Elementar" de Prof-ro F. S. Almada. Kiu interesiĝos pri tiu libro volu sin direkti al li laŭ la jena adreso: Rua 15 de Novembro, 666 - CEP- 96.100 - Pelotas (RS).

SÃO SEBASTIÃO DO CAÍ (RS)

La vicprezidanto de BKE, S-ano - George Oto Vaske invitis la geedzojn Almada viziti tiun urbon. Ĝi estas malgranda - sed pura. La strato "Esperanto", kie li loĝas, tre longa, estas parfumita de oranĝfloroj.

S-ano Oto Vaske aktivis en tiu urbo. Li presigis specialajn kartojn kun la gramatikaj reguloj de Esperanto resumitaj, kiuj estas vendataj en la urbo.

Volinte aĉeti kelkajn el tiuj mi min direktis al vendisto eluzante Esperanton, kio embarasigis la vendanton. Kiu vizitos tiun bon faru la samon. La agrablan viziton al - Caí, ni dankas al ge-S-roj Vaske, neforgesante la plezuron tie ĝuitan.

ATENTU! L.L.K. INFORMAS!

Estis decidite, ke la aliĝkotoj al la - UK 66-a ĝis la fino de 1980 ne altiĝos: - Individua Membro de UEA pagas 70 guldenojn: Junulo ĝis inkluzive 20 jaroj pagas 38 - guldenojn: - Studento plentempa ĝis inkluzive 30 jaroj pagas 63 guldenojn. Oni atentu pri la kurzo de la guldeno!

S-ano Carlos S. Cunha, membro de la L.K.K. informas, ke la filmo esperante parolata daŭras je dispono de la societoj, kiuj deziras ĝin prezenti al siaj anoj. Volu sin direkti al la LKK kaj oni pruntos ĝin, cele de propagandi pri la 66-a UK. La adreso: Cx. Postal 13-2088 - CEP 70.000 - BRASÍLIA (DF).

BEJO - INFORMAS

Estas grave, ke la sidejo de la Brazila Esperanta Junulara Organizo - BEJO, troviĝas en Brazilio (FD). Ĝis nun nur kelkaj membroj loĝis tie, sed nun la prezidanto de BEJO, s-ano Fabrício R. Valle, ankaŭ transloĝiĝis tien.

La estraro de BKE emas helpi al la junulara organizaĵo kaj firmigi ĝin. Atingis nin la Bulteno N^o 1 de Bejo kaj ni deziras aliajn, same valorajn informilojn de nia kara BEJO. Helpu ni la junularon!

SAKO

En la kadro de la 66-a UK estas programita de ESLI - Esperanta Ŝako Ligo Internacia okazigi la 11-an ŝakfestivalon en Brazilio. La ĉefa celo estas propagandi pri la internacia lingvo inter la ŝakludantojn.

La organizantoj de la 11-a Ŝakfestivalo de ESLI bezonas apogon de ĉiuj kaj petas monhelpon de Krz, 50,00; - sumon, kiun oni povas sendi al la kasisto José Leandro C. Bruzquez - Cx. Postal 53 - CEP 37.200 - Lavras (MG). La ŝakludantoj antaŭdankas ĉies helpon!

BRAZILIO (FD)

La sekretario de la LKK de la 66-a UK sendis leteron al "União dos Escoteiros do Brasil" - Cx. Postal Nº 04-0079 - CEP 70.000 - BRAZILIO (FD) pledante por starigo de Esperanto-Fako, kaj ni deziras peti, ke ankaŭ, ĉiuj esperantistoj en ĉiu regiono informu nin pri la skolta movado. Kiu havas sperton pri tiu Kampo volu sciigi tion al li. Jen lia letero:

Prezados Companheiros,

Considerando os laços de afinidade que unem os movimentos Escoteiro e Esperantista e tendo em vista os entendimentos pessoais já mantidos com V. Sas., durante uma reunião do CENA, tomamos a liberdade de propor a criação, junto a essa Direção Nacional, de uma Assessoria Especial de Esperanto, que teria as seguintes finalidades:

- 1 - Assessorar a Diretoria da UEB, o Comissário de Assuntos Internacionais e outros órgãos diretivos, em todos os assuntos referentes ao Esperanto.*
- 2 - Manter contato permanente com a Skolta Esperanto Ligo (Liga dos Escoteiros Esperantistas), com sede na Holanda, com o seu representante nacional do Brasil, Sr. Eluisio Bueno, e com as organizações esperantistas, no Brasil e no exterior.*
- 3 - Realizar cursos de Esperanto nos organismos escoteiros de todos os níveis, em todo o país, segundo o in-*

teresse que estes vierem a demonstrar.

- 4 - Publicar, logo que possível, um periódico bilingue (Português-Esperanto), a fim de divulgar notícias do escotismo e do esperantismo, no país e no exterior.*
- 5 - Promover por todos os meios, o conagraçamento dos dois movimentos, propugnando para que ambos participem juntos nas diversas atividades comunitárias*

Desde já agradecidos pela atenção que dispensarem à presente, subscrevemo-nos

cordialmente,
Nelson Pereira

do Conselho Brasileiro de Esp.

POŝTO KAJ TELEGRAFO

De la komenco BKE klopodadas por ke estu en Brazilo perantoj aŭ reprezentantoj de ĉiuj fakaj organizaĵoj, kaj ni tion ja sukcesis pri kelkaj. Tamen, koncerne al Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista E-Asocio (Poŝtkesto 25 - 1000 Sofia - Bulgario) ni tute ne sukcesis ĝis nun. Konsiderante la gravecon de komunikado en la nuna mondo kaj ĉefe en nia movado mem, ni faras specialan alvokon, ke iu fakulo akceptu tiun taskon.

MONO RICEVITA POR LA BULTENO

Ni dankas al la jenaj donacintoj:

Lanoy Dorin-Itu	200,00
Assir Costa-B.J. Iguape	100,00
Esperantaĵoj Venditaj	3300,00
Libroj venditaj	1348,50
Espedita C. Feitosa	350,00
Salvador Raymundo	350,00
Claudio Zimmermann	150,00
Cr\$	5798,50

Juiz de Fora (MG)

S-ano Kleber Malfeld, transdonis al ni peton de s-ano Emil Maté, el Hungario, ke ni diskonigu pere de nia I.B.ke en novembro okazos esperanta ekspozicio kaj leter-vespero, en la centra kulturdomo, de Dunaujváros. Brazilanoj volu sendi leterojn kaj esperantaĵojn al adreso: Haladás Esperanto Kŕr, Dunaujváros, Pf. 139, H-2401, Hungario. Anticipe dankon.

São Paulo (SP)

Frofino Elvira Fontes, prezidantino de São Paulo-Esperanto Asocio, informas nin, ke laŭ Dekreto nº 16.808/80 de la Komunumo de São Paulo, estas aprobita la nomumo de iu strato "LASZLO ZINNER", homaĝe al nia forpasinta s-ano, en tiu urbo. La inaŭguro de la strato estos anoncota.

RIO DE JANEIRO (RJ)

S-ano Delio Pereira de Souza informas nin, ke la Radio Vieno sendos senpage al ĉiuj interesatoj unu ekzempleron de la broŝuro "Superrigardo pri Aŭstrio".

La mendon oni faru al Esperanto Redakcio de ORF Würzburggasse 30, 1136 Viena — Aŭstria. Li skribis, ke aperos la venontan Decembron, en internacia lingvo, la verko de D-ro Huberto L. de Araujo — "De Francisko el Asizo por vi". Tre interesa legaĵo.

LAVRAS (MG) - ALVOKO:

2º ACAMPAMENTO ESPERANTISTA BRASILEIRO

CACHOEIRA DA FUMAÇA
de 26 a 31/janeiro de 1981

Sob os auspícios do Lavras Esperanta Klubo e BEJO acontecerá o 2º Acampamento Esperantista Brasileiro de 26 a 31 de janeiro de 1981 na "Cachoeira da Fumaça" que dista aproximadamente 50 km de Lavras.

Se você gosta do que é belo, da natureza em sua amplitude, não poderá perder esta oportunidade. A Cachoeira da Fumaça é um local distante do "corre-corre" da vida urbana, sem poluição, onde você poderá descansar, pescar e nadar.

Sua presença será motivo de muita alegria para a família esperantista lavrense. Você terá que trazer apenas sua barraca, prato, talheres, copo e demais objetos de uso pessoal. A alimentação, típica de acampamento será por conta do Lavras Esperanta Klubo.

INFORMAÇÕES:

- Será providenciado alojamento gratuito aos participantes que chegarem à vespera (sem alimentação).

- A partida será de Lavras dia 26.01.81 às 6:00 h na Estação Ferroviária.

- Chegando a Lavras informe-se pelos telefones: 821-2624 ou 821-2640, ou dirija-se diretamente ao Clube Esperantista de Lavras — Rua D. Inácia, 163 (Maçonaria).

PREÇOS DAS INSCRIÇÕES:

até 30.09.80 — Cr\$ 200,00

até 30.11.80 — Cr\$ 300,00

até 10.01.81 — Cr\$ 400,00

(prazo máximo para fazer a inscrição).

- Remeta a quantia por vale postal ao tesoureiro: Wilson de Souza Andrade
Rua João Mattiole, 413
37.200 — LAVRAS — MG

- Traga ao Acampamento: jogos, instrumentos musicais e muita vontade de usar Esperanto ! ! ! ! !

MAIS INFORMAÇÕES: Escreva ao Sr. Luiz T. Silva — Caixa Postal, 53 — 37.200 — LAVRAS — MG.

RIBEIRÃO PRETO (SP) ALIMONDAJ ESTULOJ

Jocelino Facioli Júnior
EEPG. Prof. Sebastião Fernandes Palma.
Ribeirão Preto.

Ni ne povas certigi nek jes nek ne, ĉar neniu sur la tero vojaĝis al alia planedo kaj neniu estulo diris de kie ili estas.

Multaj personoj jam vidis diskflugiloj, eĉ eniris interne ilin; sed ni ne scias de kie ili estas — altaj au malaltaj — ĉar ili ne parolas nian lignon, ni ne scias kiel komuniki

kun ili, eĉ ili ne scias komuniki kun ni. Estas pro tio ke ni ne scias de kie ili venas kaj kion ili volas. Ni ne scias se ili estas pli superaj ol ni, se ili venas helpi nin aŭ por fari militon kontraŭ ni, aŭ fine, se ili venas apenaŭ por studi nin, por scii kiel ni estas. Por havi diskflugilojn tiuj estuloj devas esti tre inteligentaj, ĉar por fabriki tiujn ĉi aparatojn ne estas facili, ĉu ne? Se io estas erara ili povas eksplodi en la aero.

La Ufologio - (scienco kiu studas la diskflugilojn) pensas ke la alimondaj estuloj venas tie ĉi por studi nin. Ŝajnas al mi, ke se ili venas por fari militon ni ne rezistus al iliaj kosmaj radioj.

Tamen ni ne devas maltrankviliĝi nin, ĉar tiuj estuloj jam prenis iujn homojn kaj ne faris malbonaĵon al ili, nur anlizis ilin.

Se fakte ekzistas alimondaj estuloj ni la teranoj salutas ilin kun emocio.

Esperantigis — Manoel Moacir Siscatti.

26/07/80

BARRA MANSÁ (RJ)

La gazeto "Integração", el Volta Redonda (RJ), kaj "O Líder", el Barra Mansa (RJ), nuntempe aperigas artikolojn pri Esperanto kaj pri nia movado. La artikolojn vendas nia juna amiko Pedro Albeirici, studento en Valencia (RJ). Tiu dinamika junulo laboras multe por la Zamenhofa idealo. Li klopodas ĉe la aŭtoritatuloj en Barra Mansa sukcesi aprobon por ke oni nomumu straton "Esperanto" al iu promenejo de la urbo. Li, ĉe la Filozofia Fakultato de Valencia, instruis la internacian lingvon al siaj kolegoj kaj nun volas fondi Esperanto-societon en tiu urbo. Li skribis al ni: "Ĝoje kaj senhalte mi laboras por la venko de Esperanto". Al nia juna kaj laborema amiko ni deziras plenan sukceson.

PROMISSÃO (SP)

La vicprezidanto de BKE, s-ano Lair Alves Moreira, sendis al ni gazetel-tranĉaĵon kun foto sur kiu aperas gekursanoj kun la prof-ro Valdemir Moreira.

Prof-ro Valdemir instruas la internacian lingvon al ĉirkaŭ dekkvin gelernantoj en la "Escola Gentil Moreira". Ni gratulas

al la prof-ro Valdemir kaj al novbakitaj esperantistoj.

O "Jornal de Promissão" aperigis interesan artikolon de prof-ro V. Moreira pri la 66-a UK en Brazilio.

BUENOS AIRES (Argentino)

NI KONDOLENCAS - La 30-an de julio, 1980, mortis post longa malsano, en Buenos Aires, la konata verkisto kaj instruisto Georgo Hess. Li verkis lernolibron hispana-esperantan. Ĉiam agema, plurfoje vizitis Brazilon kaj lastatempe preparis kun sia edzino libron pri kuir-preceptoj. Ni kondolencas lian edzinon Klara Hess.

CHAPECÓ (SC)

Alvenis propagandilo de s-ano Gersi Alfredo Bays pri la nova de li eldonita revuo "FONTO", monata beletra revuo. Interesatoj povas aboni ĝin sendante Cr\$ 660,00 (jarabono) per ĉeko aŭ poŝtmandato en la nomo de Gersi Alfredo Bays, Caixa Postal Nº 49 — CEP 89.800 — Chapecó (SC) — Brazilo.

La kunlaborantoj estas mondkonataj esperantistoj, inter kiuj troviĝas Wiliam Auld.

"HEROLDO" FARIĜAS 60-JARA

En aprilo 1920, ekzakte antaŭ 60 jaroj, aperis en la vilaĝo Horrem apud Kolonjo (Germanio) la unua numero de la sendependa internacia gazeto "Esperanto Triumfonta", kiu kelkajn jarojn poste alinomiĝis "Heroldo de Esperanto".

Ĝia tiam 26-jara fondinto, Teo Jung, kun granda optimismo, fervoro kaj obstino gvidis ĝin kaj dum pli facilaj jaroj — kiam la gazeto, en la 20-aj jaroj — aperadis 10-paĝa dufoje semajne, kaj dum pli malfacilaj jaroj, kiam li en 1936 devis forlasi sian propran landon kaj instaliĝi en Scheveningen (Nederlando).

En januaro 1962, pro emeritiĝo, Teo Jung transdonis la gazeton al Ada Fighiera-Sikorska, kiu plue redaktas ĝin. Tiu-ĉi nova periodo de la redaktado okazis unue dum 17 jaroj en Bruselo, kaj ekde aprilo 1979 ĝi efektiviĝas en Madrido.

La 14-an de aprilo 1980 aperis la 1664-a numero de "Heroldo de Esperanto", kiu daŭre estas la plej ŝatata kaj la plej ofte aperanta internacia Esperanto-gazeto.

En 1979 "Heroldo" eldonis "Tra dezerto kaj praarbaro" de H. Sienkiewicz, pola literatura Nobel-premiito 1905. Nun en preparo estas: la kvara eldono de "Paŝoj al plena posedo" de W. Auld (la tria eldono jam elĉerpiĝis), la eldono de modernaj lenolibroj en la franca, angla kaj hispana.

Ena la pasintaj jaroj "Heroldo" eldonis kelkajn "Sciencajn Suplementojn": ekzempleroj de la lasta pri "Mensa sano" kaj "Matematiko" estas senpage haveblaj ĉe la adreso de HdE, C/J. Ramon Jimenez 28,6º A; Madrid 16. Oni povas ankaŭ mendi la duoblan kongresan numeron aperontan en septembro.

Detala historio de "Heroldo" ĝis 1962 estas priskribita en la biografia libro de Teo Jung "Ĉiu ĉium", aperinta pasintjare ĉe la eldonejo TK/Stafeto, Schoten.

LA BLINDULOJ PROPONAS ALTERNATIVON

Ne estas la alveno de la stato de blindeco kiu, por ulo aŭ grupo, estas malfelico pli grava ol la morto; ne estas la handikapo kaŭzita de la blindeco, kiu estas la plej grava malhelpo: la mortiga, nekaptebla malamiko malkaŝenda kaj atakenda estas la konformismo kaj oportunismo.

Estas fakto ke, ĉiujare, homoj estas propetataj de karitataj organizoj kaj ke multaj finance helpas.

Ekde sia stariĝo, la karitataj organizoj, t.n. "por la bono de la blinduloj", nenion funde solvis. Tial ni proponas jenan alternativon:

Anstataŭ la tradician nerektan helpon al la blinduloj, submetitaj de nekreamaj karitataj organizoj koncentremaj, alportantaj malmultajn profitojn al la blinduloj kiuj senrajtigitaj suferas, ni proponas la senperan helpon liberigantan kaj disflorigantan al la organizitaj, aŭtonomaj ne administrantaj blinduloj.

Ĉar 1981 estas proklamita de la Unuiĝintaj Nacioj kiel Internacia jaro de la handikapuloj, ni proponas al vi la jenajn librojn je la prezo de po 400 belgaj frankoj:

"Problemoj de la nevidantoj - Travivita sperto dum aktivado en la Liegâ Unuiĝo de la Blinduloj".

"Analizo de la interrilatoj de la grupo de la blinduloj al la diversaj societoj de la industriigitaj landoj eŭropaj".

José STARCK

Boulevard des Guérets 46

B-4880

SPA

Belgio (Eŭropo)

P.ĉ.K. 000-0750978-04

NOVA "ESPERANTA RONDO" EN PORTO ALEGRE

La Spiritisma Societo Allan Kardec havas nun ĝian Departementon de Esperanto, aŭ "Esperanta Rondo", fondita en julio. Direktorino, Sr.-ino Lucila Fernandes. Precipaj aktivecoj: kursoj, muzikado, poeziado, teatro, biblioteko. La estimataj esperantaj kolegoj povas kunlabori en la aktivecoj kaj profiti la bonfarojn de la nova asocio, lokita en: Rua Andrade Neves, 60 - tel.: (052) 24-57-27 - Porto Alegre.

(a) Carlos A. Ducatti

Subdirektoro de la Ekstera Diskonigo

LETERVESPERO. Realigota en Decembro 1980. Sendu esperantajn, p.k., esperantajn librojn, prospectojn, broŝurojn, revuojn, k.t.p. Estos 10 libro-premioj por la plej bonaj sendaĵoj. **ESPERANTO LERNEJO** - Casilla de Correo 278 - 2000 ROSARIO - Argentino. Respondo garantiata.

CURITIBA KAJ LA ESPERANTO-MOVADO (PR)

Dum pluraj jaroj en Curitiba la Esperanto-movado dormetis, sed pasintjare nia vicprezidanto Olsen Bento da Cruz organizis kurson kun granda sukceso.

Inter la novbakitaj, bonaj esperantistoj, troviĝas tri aktivuloj, kiuj nuntempe gvidas kursojn: F-no Espedita C. Feitosa, Itacir Luchtenberg kaj Paulo Dias S. de Oliveira. Unu el la direktoroj de la Universidade Federal do Paraná, Prof-ro Helio de Freitas Puglielli apogas la instruistojn, permesinte la instruadon de Esperanto en salono de la Universitato, kaj promesis firme subteni la movadon. En Curitiba nuntempe ekzistas sep Esperanto-kursoj gvidataj de veraj aktivaj idealistoj.

La prezidanto de la societo, s-ano Gert Drucker, kune kun la direktoraro kaj aliaj sindonaj esperantistoj klopodas reorganizi

la movadon en Curitiba.

F-ino Espedita C. Feitosa sukcesis trovi la buston de Zamenhof, kiu estis starigita en netaŭga loko, okaze de la 7-a Seminario de Esperanto de KKE, en la jaro 1972-a. Intertempe oni forigis ĝin je nekonata loko. Sam-ino Espedita trovis ĝin kaj nun oni intencas ĝin restarigi iel. La daton de tiu solenaĵo ni anoncos ĝustatempe.

Estas laŭdinda la poresperanta laboro de niaj samideanoj el Curitiba.

GAZETOJ RICEVITAJ

Ni ricevis la jenajn gazetoj, kiuj ĉiam pritraktas la Esperanto-movadon: Kvakera Esperantisto, Svisa Fervojisto, Sekso kaj Egaleco, Boletim (AL), Suda Stelo, BEJO-Bulteno, Esperanto Katolika, Correio do ABC, Jornal da Manhã, O Jornal, Integração, Jornal dos Congressos, O Lider, Diário de Taubaté, Brazila Katoliko, Mundo Espirita, Jornal de Jundiá, Gazeta da Bahia, O NO SSO.



**VELHO MADALOSSO
STA. FELICIDADE CURITIBA-PR.**

Okaze de la vizito de la geedzoj Almada al Curitiba, la tieaj Geesperantistoj ofertis al ili interfraternigan vespermanĝon en la "Velho Madalosso". Sur la foto. starantaj, de maldekstre: - Assir Costa, Salvador Raymundo, lia edzino, Marilene Raymundo (sidanta) kaj Olsen Bento da Cruz; sidantaj: F.S. Almada, lia adzino Maria Almada, F-ino Espedita C. Feitosa kaj pastro Pedro Urbaitis.